Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Julio-Aŭgusto 2018 | n-ro 07-08 (1357-1358)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Poemoj de Puŝkin



## AL LA BEBO

Ne povas mi, ho, kara id' ,
Al vi disdoni vantajn benojn.
Anim' de vi, rigard' de fid';
De la ĉiel' konsola greno...

Ke klaru via taga ar' ,
Kiel okuloj viaj klaras.
Soldatoj de la sorta gard'
Por vi nur bonon ja preparas.
1824

## AL SIBERIO

En la profund' de ĉia erc'
Vin helpos sole pacienco,
Ne estos vana ĉi ekzerc'
Kaj alta streb' de l' pens-esenco.

De malfeliĉo je ekstrem'
Espero, ho, fratin' fidela,
Plenigos vin per ĝojo hela,
Alvenos iam tiu temp':

La amikec' kaj pura am'
Vin trafos, kvazaŭ glora pruvo,
Samkiel trafas bagnan truon
Sub ter' lontana ĉi deklam'.

Fin' de l' prizon' – ĉe solidar';
Katenoj pezaj baldaŭ falos
Kaj la libero ekbrilados,
Fordonos glavon la fratar' .
1827

## EĤO

Ĉu roras en densejo best' ,
Ĉu tondras aŭ ĉu kornas fest',
Virgino kantas aŭ tempest', —
Ĉe ĉiu son' ...
Resonas ja de vi ĉeest' ,
Nur je aldon' .

Jen ŝtorm' ... Aŭ kri' de vagabond' —
Reson' por ĉio en la mond' ,
Sed por vi mem ne eĥas ond',
Nek eĉ ventet';
Kaj same mankas la respond'
Por vi, poet'!
1831

## PROFET'

Spirite tre soifa, mi
En la dezerto malespera
Vagadis, kaj ĉe l' vojkruciĝ'
Aperis ĉefanĝelo pera.
Mildege, kvazaŭ papili' ,
Pupilojn miajn tuŝis li:
Kaj malfermiĝis la okuloj
Por novaj huloj de aŭguroj.
Orelojn miajn tuŝis li,
Aŭdebla iĝis la ali':
Min tuj plenigis trem' ĉiela,
De l' fora vito vegetad' ,
De l' maraj vermoj navedad' ,
Kaj sferoj de l' anĝela belo.
Min kaptis ĉiopova man'
Kaj mia vanta peka lang'
For elŝirita estis, ruza.
Anstataŭ al la sanga buŝ'
Serpentan langon per la puŝ'
Li metis por la saĝa uzo.
Kaj mian sinon trafis glav',
El brusto mia oscedanta
Li koron prenis. Postenhav'
Fajrarda venis, sukcedante.
Mi kuŝis, kvazaŭ jam mortint' ,
Kaj tiam Di' alvokis min:
"Revivu, vi, profet' de l' mondo.
Ek! Vidu, aŭdu, ardu plu!
Kaj per fervora vort' estonta
Flamigu koron de ajnul'... "
1826

Tradukis: *Espopore*

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen la juli-aŭgusta numero de Sennaciulo, finpretigita en aŭgusto, sed denove nur 24-paĝa kaj sen sistemaj interŝanĝoj kun la aŭtoroj pri la proponitaj korektoj. Ĝi plej verŝajne atingos viajn leterkestojn mallonge post la numero majo-junia, por kiu la ekspedo estis malfruigita pro ferioj de la presisto, pri kiuj ni ne havis la tempon antaŭinformiĝi.

La materialo por tiu ĉi numero estis kolektita antaŭ la kongreso, kaj parte korektita dum ĝi. La dumkongresa laborgrupo pri redaktado de *Sennaciulo* ĉefe estis utiligita por praktika ekzercado per enkorpigo de korektoj por *Sennacieca Revuo*. Detalaj prikongresaj raportoj aperos en la venonta numero. Vi tamen jam povas legi la Gvidrezolucion kaj Deklaracion en la retejo de SAT, kaj eĉ partopreni en la traduko nacilingven de la Deklaracio.

En la SAT-retejo ankaŭ aperas unuaj informoj kaj provizora aliĝilo por la venontjara SAT-kongreso, okazonta inter la 4a kaj la 11a de aŭgusto 2019 en Barcelono, en loko kie estas akceptataj rifuĝintoj. Pli pri tio en venontaj numeroj!

Agrablan legadon kaj pretiĝon por nova kunlaborjaro deziras al vi

La redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Sennaciulo 11-12/2018 (1357-1358) : 10a de oktobro

Sennaciulo 1-2/2018 (1359-1360) : 10a de decembro

**Kovrilpaĝa bildo**

Aŭtoro: Vicente López Tofiño

## Enhavo


### Tra la Mondo - Koreio/Usono
4 Pinta konferenco inter Trump kaj Kim

### Tra la Mondo - Mezoriento
6 La delokigitoj de Afrino
8 Kurda junularo
9 Tradicioj estas diversaj

### Tra la mondo - Latvio
10 En malliberejon pro longa lango
10 Deklaro de la Latvia Socialista Partio pri la rezultoj de elektoj al organoj de loka memregado

### Sindikatismo tutmonda
11 Exxon Mobil: Estas tempo por justa akordo kun la laboristoj
11 La laboristoj de Oracle strikas
12 XPO: estas tempo malfermi dialogon!
12 Post preskaŭ jaro da striko, estas tempo por DPHL intertraktadi kun la sindikato
12 Venis la tempo por Wendt intertraktadi kun la sindikato

### Medio
13 Kiam pereos la homaro?

### Beletro
2 Poemoj de Puŝkin
15 Ora epoko en la rusa poezio: Aleksandr Puŝkin
23 Esperanta poezio malgraŭ pluvo

### Sciencoj kaj teknikoj
18 Kiel artefarita inteligenteco influos la homvivon?

### El la SAT-Administrejo
22 Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj



*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***